

REDAKCIO:
PRAHA II. DITTRICHOVA UL. 7. BOHEMUJO.
ED. KÜHNL.

5. VIII. BOHEMA REVUO ESPERANTISTA. 1914.

Cena: 30 hal.

Nepovažujeme za povinnost odpovídati na dotazy, k nimž nebyla přiložena známka na odpověď.

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ
BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

Kun literatura aldono

LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.)

(OFICEJO: PRAHA II., VODIČKOVA ULICE 38.)

Vychází 10krát ročně (kromě prázdnin).

Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk a vrací netištěné rukopisy, byla-li přiložena známka; práce původní mají přednost.

Předplatné v Rakousku 3 K, pro cizinu Fr. 3·75 = $1^{1}/_{2}$ Sm. Účet pošt. spoř. 93.281.

(Prosíme o adresy přátel Esperanta, kterým bychom mohli zaslati s úspěchem ukázkové číslo.)

Aperas dekfoje en jaro (krom libertempo.)

La redakcio rezervas al si la rajton arangi la artikolojn por preso kaj resendas manuskriptojn nepresitajn, se poŝtmarko estis almetita; artikoloj originalaj estas preferataj.

Abono en Aŭstrio 3 K, por la fremdlando Fr. 3·75 — $1^{1}/_{2}$ Sm.

Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista en London. (Filio: Dresden, Bankejo Arnhold.)

Příští číslo vyjde po prázdninách.

NA OBRANU ESPERANTA.

Cena: 40 hal.

Výtah z Kotzinovy knihy:
„HISTORIO KAJ TEORIO DE IDO“.
(Esperanto kripligita).

„**Časopisu Českých Esperantistů**“ právě vyšlo č. 9, 9bis a 10, z r. 1913 (stávkou v tiskárně bylo vydání těchto čísel zdrženo) a obsahuje kritické pojednání o bezcennosti plagiátů Esperanta, pod jehož jménem však autoři nových návrhů (stále měněných a plných nepravidelností a výjimek) vydávají své publikace, snažíce se tak klamati nečestným způsobem veřejnost. Objednejte zvláštní otisk tohoto dílka „**Na obranu Esperanta**“ v redakci. Cena 40 h. (Pro členy spolků B. Č. E. po 30 h).

B. KOTZIN, čefred. de „La Ondo de Esperanto“:

Historio kaj teorio de Ido.

(„Esperanto kripligita“).

144 str. Cena K 1·40. (Mendu ĉe la red. de Č. Č. E.).

Doporučujeme tuto knihu vřele každému, kdo chce podrobně poznati Idisty vychvalované „reformy“ a přesvědčiti se o bezcennosti jejich stále „zdokonalovaných“ projektů.

Učebné pomůcky pro Čechy.

ČLEN ESPERANTSKÉ AKADEMIE (**mluvnického odboru**) **Antoni Grabowski** píše v „Pola Esperantisto“ 1913, I.: KÜHNLOVA ÚPLNÁ METHODICKÁ **UČEBNICE** pro školy a samouky vyšla ve třetím doplněném a rozšířeném vydání. Již vnější stránka Kühnlovy Methody jest tak vábná, tak nádherná (velmi pěkný papír, tisk, sazba), že jest vskutku požitkem vzíti tuto knihu do rukou. Bohatý, výtečně zpracovaný obsah zcela odpovídá zevnějšku. Jsme tedy jisti, že učebnice ta, které, pokud nám známo, bylo používáno ve 150 českých kursech s nejuspokojivějším úspěchem, bude i nadále pomáhati se stejným výsledkem na šíření našeho drahého jazyka v pokročilých Čechách. Autor vždy hledí v první řadě k tomu, aby žáci postupovali od věcí známých k neznámým a vždy se snaží navazovati ve vysvětlivkách novinky na příbuzné body mateřštiny. Protože Kühnlova Methoda obsahuje kromě gramatiky, cvičebnice, rozmluv a slovníčků také dosti obsáhlý výbor esperantských článků o dějinách Esperanta, o jeho literatuře, o našich kongresech, organisacích atd., získá každý, kdo pilně prostuduje toto dílo, již dosti podrobnou znalost a poučení o našem jazyku a o naší věci. (*Cena K 2·40; stran 144.*)

PODROBNÝ SLOVNÍK ČESKO-ESPERANTSKÝ (25.000 hesel) **již vyšel** (288 str.) K 3.60. — **Slovník esperantsko-český** jest obsažen v českém vydání „Fundamento de Esperanto“ 1 K 10 hal. vyplaceně.

Poznámka. Česko-esp. slovník s proloženými bílými listy o 1 K dražší. Týž s indexem (abecedou po straně) rovněž o 1 K dražší. Týž proložený a s indexem o 2 K dražší.

Pro korrespondenci s cizinou:

PRAŽSKÉ POHLEDNICE

s texty a vysvětlivkami

esperantskými

30 různých druhů.

Serie K 1·50.

Poštou serie: K 1·70.

(Jednotlivě po 6 hal.)

Objednávky vyřizují se pouze za obnos předem zaslaný (složním lístkem redakce „Časopisu Českých :: Esperantistů“ nebo v dopise ve známkách). ::

Praha II., Vodičkova ul. čís. 38. Esperanto-Oficejo.

CO JEST ESPERANTO? Česká informační brožura (16 str. 3 h. — 50 kusů K 1·20.

Novinka! **NÁLEPKY.** **Novinka!**

Esperantské hvězdičky

šest druhů.

Cena 120 kusů (roztříděných) K 0·53. (Praha II. Vodičkova 38.)

MARTIRO JOHANO HUS.

Tri datoj el vivo de Hus estas por ni precipe signifoplenaj. La unua estis la 18. de junuaro 1909: tiun tagon malgajiĝis la magistroj ĉe la universitato en Praha, kiu tiutempe estis ankoraŭ en manoj germanaj. Hus pruvis antaŭ reĝo Venceslao, ke li, kiel reĝo, devas defendi la bohemajn magistrojn. Li aludadis la maljustecon en la dekreto de Karolo IV., kiu lasis kvar voĉojn al la germanaj magistroj, sed la bohemaj havis sole unu. Estis nun celite, ke Bohemoj, kiel eminentaj faktoroj en la scienco, havigu estimon al sia patrujo kaj al sia laboro. Sed la bohemaj magistroj ne estis akceptitaj favore: la reĝo ne ŝatis vidi la naskiĝantan malkontentecon. Li timis, ke lia potenco en Germanujo ne estu ŝancelita. Tial li ne plenumis tuj la deziron de la bohemaj magistroj. Sed Hus, ĉirkaŭita de kelke da amikoj kaj de viroj, kiuj, kvankam ili ne konsentis kun li en demandoj religiaj, tamen trovis en ili kunhelpantojn en laboro celanta edifon de la gepatra lingvo kaj de la komuna patrujo.

Tiuj stariĝis kontraŭ la malfavora plenumo de la nomita deziro. Ribelo naskiĝis, precipe sub influo de la franca delegito.

La reĝo decidiĝis proklami definitive la bohemajn magistrojn pravaj kaj difinis por estonta tempo, ke al Bohemoj apartenas tri voĉoj kaj al Germanoj sole unu.

Tiu ĉi estas la unua historia tago.

La venko de la bohema lingvo ĉe la universitato estis triumfo, kiu kulminaciis, kiam en la jaro 1413 laŭ edikto de reĝo Venceslao estis ŝanĝita la magistrata regularo de urbo Praha kaj kiam estis aljuĝita al Bohemoj en la malnovurba konsilantaro la sama nombro da voĉoj kiel al Germanoj.*)

Sekve rilatas je la tempo 1409—1413 du akirajoj, sur kiuj baziĝas ĝis hodiaŭ rezisto de la bohema nacio: scienco flanke de la universitato kaj municipaleco flanke de la popolo. Jen la plej bona pruvo pri tio, ke Hus estis protagonisto de la granda movado, kiu garantiis la sendependecon de Slavoj en Bohemujo.

La dua faro de Hus estis, kiam interdikto estis proklamita super Praha, ke li forlasis la urbon, timante, ke lia verko ne estu sufokita, kaj rifuĝis en kamparon proksime al Tábor (en suda

---

*) De post la j. 1861 konsistas la urbestraro sole el Bohemoj
R. d. l. t.

Bohemujo). Kaj ĉi tie li plene sin dediĉis al editado de la popolo, predikante al anaroj, al kiuj ĝis tiu tempo predikadis sole pastroj. La magistroj turniĝadis sole al studentoj. Hus mem ne ekrilatis ĝis tiu tempo kun la kamparanoj, kiuj ĝis hodiaŭ estas la plej persistema apogo de la bohema nacio. Kaj al ĉi tiuj anaroj, kiuj ne komprenis la saĝumadon de teologoj kaj la skolastikon de Wicleff, sed kiuj komprenis vortojn de la magistro, kiam li parolis al ili pri la regno de Dio, Hus predikadis pri la vivo postmorta kaj pri neceso forigi la tradicion de la perforto kaj venĝo. Tiujn predikojn konservis la popolo malgraŭ la centjara subpremo enskribitaj en profudeco de sia koro kaj kiam la popolo ekvekiĝadis, tiam ĝi rememorigis al si liajn vortojn pri la libereco, moraleco kaj progreso.

Fine ĝi estis la 7. de junio 1915, kiam Hus estis starigita antaŭ la eklezian tribunalon. La papo unue metis kelke da demandoj pri la dogmo kaj pri kelke da doktrinoj. Sed kio plej multe nin interesas, tio estis la kuraĝo, kun kiu Hus defendadis sian konvinkon. Oni postulis, ke li revoku kelkajn doktrinojn kaj Hus respondis je ilia insistado: „Inter la herezaĵoj, kiujn vi atribuas al mi, estas kelkaj, kiujn neniam mi predikis, sekve mi ne povas ilin revoki kaj pri aliaj mi estas konvinkita, ke ili baziĝas sur mia konvinko kaj sur vero“. Kaj kiam post kelke da tagoj unu el liaj partianoj Stefano Páleč lin elserĉis en la malliberejo kaj klopodis decidigi lin, ke li almenaŭ konfesu la pekojn, li energie respondis: „Je neskribita mi ne povas juri“.

Sed Hus restis konsekvenca kaj ne perfidis la veron, ĉar li ne povis konfesi tion, kion li ne faris kaj en tio li persistis eĉ sur la ŝtuparo. Jen la tri fundamentaj punktoj, kiujn Hus pagis per sia vivo, sed kiuj transportiĝis de generacio al generacio. Ĝi estas speciala speco de kristaliĝo, kiun ni ne povas kompreni.

Sed ĝi pruvas, ke influo de la granda pensulo ĉiam pli kaj pli forte turnadis al si la okulojn de nova generacio kaj faris tiel dum tempopaso, de patro al filo, malgraŭ la uraganoj, ruinoj, katastrofoj, idealon: tradicion, kiu fariĝis malgraŭ la dekadenco lumo, aŭroro, per kiu li montris vojon, meze de senfinaj teruro kaj ĝemado en vivo familia kaj politika. Hus estis gvidisto, kiu kreis novan ideon, kiu fariĝis garantio de la estonteco de popolo el kiu eliris disĉiploj de lia skolo. Hus montris tion, kion ni nomas psikologio de popolo, kies postsignojn oni trovas ĝis hodiaŭ ĉe la bohema nacio sekvanta la ekzemplon de sia Konstanz'a martiro.

(*Trad. el Denis*).

* *

Johano Hus, pastro de la katolika eklezio, magistro de universitato en Praha, predikanto en la kapelo Betlehema, estis vokita

antaŭ la eklezian tribunalon pro sia instruado, ĉar li predikis kontraŭ la indulgencoj kaj kritikis la senmoralan vivon de la pastroj. Li decidiĝis alveni kaj la roma reĝo Sigismundo donis al li pasporton, kiu garantiis al li liberan alvenon kaj revenon. Hus volis siajn principojn defendi antaŭ la plej alta kristana konsiliĝo.

Li alvenis al Konstanz la 3. de novembro 1414. Sed jam la 28. de novembro li estis arestita. Vanaj estis liaj protestoj kaj tiuj de la bohemaj nobeloj, kiuj lin akompanadis. Tenata dum kelke da tagoj en domo de unu kardinalo, li estis la 6. de decembro metita en malsekan kaj malbonodoran karceron, kiu limtuŝis la urban kanalon. Post nelonge alvenis al Konstanz reĝo Sigismundo, sed la kardinaloj paroldeturnis lin de tio, ke li zorgu pri la pasporto, ĉar — ili diris — oni ne bezonas resti fidela al sia vorto donita al herezulo. Hus grave malsaniĝis post kelke da semajnoj en sia terura malliberejo. Forta febro, sangsputado kaj ŝtono metis lin sur la randon de la tombo. Por lin savi — volante lin juĝi kaj forbruligi — oni devis lin transporti el la malliberejo kaj kuraci. Apenaŭ li iomete saniĝis, li estis metita en karceron ankoraŭ pli teruran. Malsanan kaj tiom turmentitan oni senĉese ĝenis per minacoj kaj persvadado, ke li revoku. Hus ĉiam postulis publikan aŭskulton, por ke li povu sin defendi, kaj postulis instruon el la Sankta Skribo. Sed la eklezia konsiliĝo havis jam la verdikton antaŭpreparita. La 5. de junio li estis ekzamenata antaŭ la kardinaloj, prelatoj kaj doktoroj de la eklezio. Sed kiam li sin defendis, li estis de ĉiuj flankoj silentigata per kriado. Poste sekvis ekzamenado ankoraŭ la 7. kaj la 8. de junio. Hus multajn al li riproĉatajn aferojn refutis, sed kion li instruis, tion li senkaŝe konfesis. Kiam li proklamis, ke la papo kaj la kardinaloj ne estas necesaj por la administrado de la eklezio kaj ke la papo havas sian rajton el povo de la imperiestro, kiam li konfesis, ke la pastro en la stato de grava peko ne povas distribui la gracojn, kaj ke la regnestro, grave pekinte, ĉesas esti regnestro, estis decidite pri lia sorto. Revoki! ion alian oni de li ne volis.

Post la ekzamenado la 8. de junio oni lasis ankoraŭ dum kvar semajnoj la magistron vivi. Dume alvenadis el Bohemujo petoj pri lia liberlaso. La konsiliĝo ĉiuforte klopodis, por decidigi lin al revoko. En la malliberejo vizitis lin liaj estintaj amikoj, eĉ lia plej fidela amiko sinjoro de Chlum petis lin, ke li revoku. Sed Hus rifuzis. Ke li ne revokos, antaŭ ol li estos per la Sankta Skribo instruita. Li estis malsana, turmentita, korpomalforta, sed lia spirito estis forta.

La 6. de julio 1415 oni plenumis la verdikton super la obstina herezulo. En la katedralo de Konstanz kunvenis la eklezaj

altranguloj, kaj ankaŭ Sigismundo kun sia akompanantaro. Meze de la preĝejo estis starigita eŝafodo, sur kiu estis trabo portanta ornaton. Antaŭe oni celebris meson, dum kiu Hus estis tenata de la gardistoj antaŭ la preĝejo. Post la meso estis prediko de la episkopo el Lodi kaj Hus estis alkondukita antaŭ la eŝafodon. La episkopo predikis, ke la regnestroj ekstermu energie ĉiun herezon. Poste tralegis la predikanto la artikolojn de Wicleff kaj de Hus, kiuj estis malaprobitaj. Hus volis paroli, sed la gardistoj lin malhelpis, li genufleksis antaŭ la eŝafodo kaj preĝis. Estis legataj kontraŭ li eĉ tiaj malverajoj, ekz. ke li sin prezentis kiel kvaran personon de Dio. Tiam Hus ekprotestis laŭte. Hus postulis en la preĝejo protekton garantiatan per la pasporto kaj turnis sin kun riproĉoj al Sigismundo. Intertempe estis eldirata la verdikto super liaj verkoj kaj super li. Li estis kondukita sur la eŝafodon kaj senigita de la pastreco. Oni metis sur lin ĉiujn mesajn vestaĵojn kaj donis en liajn manojn kalikon, kaj poste postulis, ke li revoku. Plorante li diris, ke li ne volas esti mensogulo kaj ke tial li ne revokos. Poste li estis malkonsekrata kun terura malbenado, eldirata de ses episkopoj, estis de li forprenita la kaliko kaj unu vestaĵo post la alia, oni difektis lian tonsuron kaj metis sur lian kapon arlekenan ĉapon kun surskribo: „Jen la ĉefherezulo!" Post tio li estis transdonita al la povo de la imperiestro por esti brulmortigita.

La ekzekuto sekvis tuj. Dum la eklezia konsiliĝo daŭrigis sian traktadon, la soldatoj elkondukis lin malantaŭ la urbon sur la ekzekutejon. Mil rajdantoj troviĝis en la procesio kaj grandaj homamasoj kunrapidis. Hus iris firmapaŝe, kantante psalmojn. Sur la ekzekutejo estis jam preparita lignaro. Li estis alligita al dika tabulo. Ĉe tiu li surgenuis kaj preĝis. Kiam ĉe tio falis lia ĉapo, li ekridis, vidante ĝin. Oni atentigis lin, ĉu li volas konfesi la pekojn. Li konsentis. Sed kiam la pastro volis doni al li absolvon sole sub la kondiĉo, se li revokos, li rifuzis. Li volis ekparoli al la popolo, oni ne permesis al li. La ekzekutistoj senvestigis lin kaj alligis per ŝnuregoj kaj ĉenoj al la tabulo. Li estis turnita kun la vizaĝo kontraŭ la oriento. Tion konsideris kelkaj rigardantoj maldeca, tial li estis turnita kontraŭ la okcidenton. Du veturiloj da ligno miksita kun pajlo estis ĉirkaŭ li dismetitaj, tiel ke li estis per ĝi kovrita ĝis la kolo. Sub liajn alligitaj piedojn oni ŝovis du garbojn da pajlo. En la lasta momento, kiam li estis tiel ligita kaj ĉirkaŭkovrita per ligno kaj pajlo, alvenis ankoraŭ sendito de la imperiestro, por ke li savu sian vivon kaj animon per revoko. Hus dirigis al la reĝo, ke li sentas sin senkulpa kaj ke li por tiu vero, kiun li instruis, volas ĝoje oferi sian vivon. La sendito ekklakis kaj la ekzekutisto bruligis la lignaron. Psalmojn kantante kaj al ĉielo rigardante, estis Hus baldaŭ ĉirkaŭita per la flamoj.

La vento leviĝinte blovjetis la flamojn en lian vizaĝon. En kelke da momentoj eĉ ne unu vorton dirinte sufokiĝis Johano Hus. Lian sentimecon admiris eĉ liaj malamikoj.

La vestajoj de Hus estis jetitaj en la brulantan lignaron. Ĉiu cindro el la lignaro estis zorge kolektita kaj jetita en Rejnon, por ke post la mortinto restu nenio, kio povus esti forportita en Bohemujon kaj honorata kiel sanktaj relikvoj de la martiro.

(*El Historio de Palacký trad. K. P.*)

SEN TITOLO.

Ĉio saĝa estis jam pensata, oni devas nur provi pensi ĝin ankoraŭ unufoje. — Kiel oni povas ekkoni sin mem? Per observado neniam, sed certe per agado. Provu plenumi vian devon kaj tuj vi scios, kia vi estas. — Granda eraro: Ke oni opinias sin pli eminenta, ol oni estas kaj ŝatas sin malpli ol oni meritas. — Tre multon ni bone konus, se ni ne dezirus ekkoni ĝin tro akurate. — Se mi eraras, ĉiu povas rimarki tion, se mi mensogas, ne. — Eĉ la plej malgranda haro ombras. — Ne ĉie, kie estas akvo, estas ranoj; sed kie oni aŭdas ranojn, estas akvo. — Kiu ne scias fremdajn lingvojn, scias nenion pri sia propra. — Kion oni ne komprenas, tion oni ne posedas. — Niaj majstroj ni nomas juste tiujn, de kiuj ni lernas. Ne ĉiu, de kiu ni lernas, meritas tian titolon. — Ĉielarkon, kiu restas kvaronhoron, oni ne plu rigardas. — Kie perdiĝas la intereso, perdiĝas ankaŭ la memoro. — Kun la scio kreskas la dubo. — Ĉio, kion ni faras kaj agas, estas sinlacigado; feliĉa, kiu ne laciĝas! — Niaj pasioj estas veraj feniksoj. Kiam brulpereas la malnova, tuj reeliras la nova el la cindro. — Oni estas neniam trompata; oni trompas sin mem. — La besto estas instruata per siaj organoj; la homo instruas la siajn kaj regas ilin. — Kontraŭloj kredas refuti nin, kiam ili ripetas siajn opiniojn kaj ne atentas la niajn. — Ekzistas homoj, kiuj pensadas pri la malvirtoj de siaj amikoj; per tio oni gajnas nenion. Mi ĉiam atentadis je la meritoj de miaj kontraŭuloj kaj profitadis per tio. (*El Maksimoj kaj Reflektoj de Goethe trad. W. Lippmann*).

Japanaj manieroj, kompare al la eŭropanaj, prezentas sufiĉe da intereso same por ni kiel por la Japanoj ĉe reciproka komparado. La esp. Bulteno de H. C. E. aperanta en Kanazaŭa-ŝi skribas pri tiu ĉi temo: Japanaj libroj komenciĝas tie, kie Eŭropano serĉas finon de la verko. La linioj estas vertikalaj anstataŭ horizontalaj; la unua estas ĉe la dekstra rando. Oni legas de supre malsupren. La „piednotoj“ troviĝas supre. La leteroj estas skribataj sur unu flanko de paperstrio, kiun oni faldas kiel vaflon. Ankaŭ

la adreso estas skribata en senco mala, ekz. Smith Petro sinjoro. Same vico da aliaj laboroj estas tute kontraŭa al la eŭropanaj kutimoj: ĉarpentisto uzas sian rabotilon movigante ĝin kontraŭ sin; librotenisto notas la sumon unualoke, nur poste la rimarkojn. Ĉe vojaĝado pagas la pasaĝeroj drinkmonon al la hotelservistaro tuj post sia alveno anstataŭ ĉe la foriro. La infanojn oni portas sur la dorso, ne sur siaj brakoj. Mastro en japana domo okupas la plej malaltan lokon, se li havas gastojn. Blazonojn oni ne pentras sur la domojn, sed oni portas ilin sur sia vestaĵo. La plej bonaj ĉambroj kaj ĝardeno estas ĉe malantaŭo de la domo. Vinon aŭ likvoron (saké) oni trinkas antaŭ la manĝado. La eŭropa proletario eble pli atentas pri pureco de sia vestaĵo ol de sia korpo: en Japanujo ĉiu, eĉ la plej malaltklasa persono, zorgas pri pureco de la korpo. Japano fariĝas unujara la lastan tagon de la jaro, en kiu li naskiĝis, dujara la sekvantan tagon (je la Nova Jaro), trijara la proksiman Novjaran tagon k. t. p. Kiu infano naskiĝis la 31-an de decembro, estas post 24 horoj jam dujara. Ankaŭ en aliaj punktoj diferenciĝas la tempokalkulado. En Eŭropo paradas la mastro per ĉiuj artaĵoj, elmontrante ilin en sia apartamento; Japano kaŝas sian trezorojn en ŝranko, elmetante sole kelke da ili — unu aŭ du por ĉiu ĉambro — por elmontri ilin en „tokonoma“, la honora loko en ĉiu ĉambro. Post semajno aŭ monato, kiam oni sufiĉe admiris ilian belecon, li anstataŭas ilin. La manĝesto esprimanta inviton eniri estas la sama, kiun faras Eŭropano por diri „foriru“. Fine, la plej stranga estas, ke Japanoj sekiĝas per malsekaj viŝiloj. (*E. Asai.*)

CIRKULEROJ.

Al Turistoj kaj Studentoj. Ĵus aperis tre bela, esperanta, ilustrita gvidlibro „Grenoble kaj Dauphiné“, eldonita en 20.000 ekzempleroj de la gravaj Asocioj: „Iniciata Sindikato por Turistoj“ kaj „Patrona Komitato por Fremdaj Studentoj“. Tiun sukceson ni ŝuldas al persistaj klopodoj de la Grupo en Grenoble, kies membro s-o Roy redaktis la verkon. Ĉar tiuj Asocioj tiel konsentis provi la taŭgecon de nia lingvo kaj faris gravan oferon promesante sendi senpage tiun 32-paĝan broŝuron, estas devo por ĉiu samideano profiti tiun okazon kaj pliriĉigi sian bibliotekon, helpante samtempe al nia movado. Post legado ĉiuj volos vojaĝi tra tiu mirinda regiono, kies belajn pejzaĝojn montras multe da artaj fotografaĵoj kaj kolora bildo de fama artisto, kaj viziti ĝian ĉefurbon Grenoble, la Alpan Reĝinon. Studentoj ĉiufakaj, sciiĝinte detale pri la Universitataj kursoj funkciantaj dum la tuta jaro por fremduloj kaj pri la multaj servoj al ili farataj de la Patrona Komitato, certe elektos Grenoble'on por perfektiĝi en la franca lingvo, lerni la juron k. t. p. aŭ ĉeesti la kursojn de la Elektroteknika Instituto. Tie ili ne nur ricevos perfektan instruadon, sed, kiel pruvas la

atestoj de la multaj samideanoj, kiuj, akceptinte la inviton de la esperantista grupo, por ĉiam konservos agrablan rememoron pri sia restado en la plej pentrinda urbo de Francujo. Petu ekzempleron per ilustrita, esperante redaktita poŝtkarto. Adr.: Syndicat d'Initiative, Grenoble, Francujo.

PRAKTIKAJ KONSILOJ.

(Multipliku rapide!)

El multe da diversaj faciligoj ĉe rapida kalkulado sole kelkaj estas en la praktiko uzataj, la plej konata estas ekzemple la duobla multipliko, se la multiplikanto estas nombro dividebla, por ŝpari unu linion kaj la sumigon.

Anstataŭ:		skribu, ĉar $8 \times 9 = 72$, jene:
	5413×72	5413×8
	10826	43304×9
	37891	389736
	389736	

Se la multiplikanto estas triloka kaj se *α)* ĝiaj unua kaj dua lokoj kune per la tria aŭ *β)* la dua kaj tria kune per la unua estas divideblaj, tiam simpliĝas la laboro per jena metodo:

α) 3569×357	(multipliku per 7):
24983	(ĉar $35 : 7 = 5$, multipliku la rezultaton nun per 5):
124915	
1274133	(kaj sumigu).
β) 3564×927	(multipliku per 9):
32076	(ĉar $27 : 9 = 3$, multipliku la rezultaton per 3, skribonte je du lokoj dekstren):
96228	
3303828	(kaj sumigu).

Pli interesa kaj pli ofte uzebla por la praktiko estas ĉi tiu metodo de rapida multipliko:

Anstataŭ:		kalkulu:	
	54×62	54	
	108	62	
	324	3348	t. e. *a)* $2 \times 4 = 8$ (sen
	3348		resto): *b)* $(2 \times 5) + (6 \times 4) = 34$,

4 skribita, $3 =$ resto: *c)* $(5 \times 6) +$ resto $3 = 33$.

32	63	67	89	28	74
38	38	73	56	92	55
1856	2394	4891	4984	2576	4070

Se la nombroj proksimiĝas al 100, procedu jene:

98   *a*) sumigu ambaŭ numerojn; *b*) forstreku la 1; *c*) multi-
94   pliku la mankojn ĝis 100 t. e. $2 \times 6 = 12$.
1|9212   Rezultato: 9212.

Rimarko: se la unuoj kune = 10, tiam simple alskribu al 90 ilian multoblon: $98 \times 92 = 9016$.

*

Trastudinte la unuan parton de tiu ĉi artikolo, sed ne pli frue antaŭ ol detale ni scias uzi la metodon priskribitan, ni povas profundiĝi en studadon de tasko pli malfacila — sed tamen pli simple solvebla kompare al la kutima laboro ĉe la multipliko de triciferaj numeroj. Se vi tralegos *supraje* la liniojn sekvontajn vi sendube ne trovos la aferon pripensinda, ĉar vi fariĝos juĝonto — neinformita.

Por skribi senpere rezultaton ekz. de 325×846, procedu jene:

325
846
274950

a) $5 \times 6 = 30$, 0 skribita, 3 resto; *b*) $(2 \times 6) + (5 \times 4) = 32 +$ resto $3 = 35$; 5 skribita, 3 resto; *c*) $(3 \times 6) + (8 \times 5) + (2 \times 4) = 69$, 9 skribita, 6 resto; *d*) $(8 \times 2) + (4 \times 3) = 28 +$ resto $6 = 34$, 4 skribita, 3 resto: *e*) $3 \times 8 = 24 +$ resto $3 = 27$ skribita.

387
564
• 218268

(2. 7, 10, 6 estas restoj parkere memoreblaj).

528	234	179	234	987
312	356	852	567	899
164736	83204	152508	132678	897313

Aldono: Por multipliki dulokajn numerojn inter 10 — 20, ekz. 14×12, *a*) multipliku la unuojn ($2 \times 4 = 8$), *b*) adiciu la unuojn ($2 + 4 = 6$), *c*) multipliku la dekojn ($1 \times 1 = 1$), sekve 168.

Ekz.: $13 \times 14 =$ *a*) $3 \times 4 = 12$, (2 skribita, 1 = resto); *b*) $3 + 4 = 7$, (+ resto 1) = 8, *c*) $(1 \times 1) = 1$. sekve 182.

18×17 . . . *a*) (8×7); *b*) $8 + 7 +$ resto; *c*) $(1 \times 1) +$ resto 306.

Konsekvence procedu, se 1 staras je fino de ambaŭ:

21 × 31 . . . *a*) la lasta 1 × 1 = 1; *b*) poste 3 + 2 = 5; *c*) fine 3 × 2 = 6, sekve: 651.

61 × 71 . . . 4331 | 51 × 21 = 1071.

LINGVA FAKO.

La amplekso de la esperanta vortaro fariĝas kun la vastiĝanta kampo, sur kiu la lingvo trovas siajn adeptojn, ĉiam pli granda; la fakaj terminoj unuflanke kaj la vortoj el la provizo de fundamentaj radikoj aliflanke estas la du ĉefaj direktoj, laŭ kiuj la plena vorttrezoro kompletiĝas. La aŭtoro de Esperanto komprenéble ne povis mem starigi plenan vortaron, kiu enhavus ĉ i u j n vortojn; nek li nek iu ajn alia persono estus kapabla tian laboron sola bone plenumi. Sed li donis al ni valoran konsilon — regulon, por ke ni povu daŭrigi lian laboron, regulon, kiu diras: la tiel nomataj „fremdaj vortoj", t. e. vortoj, kiujn plimulto de la lingvoj ĉerpis el unu, kaj la sama fonto, restas en Esperanto senŝanĝe; ili sole alprenas la internacian ortografion kaj finiĝon. De post la apero de la unua fundamenta vortaro de Zamenhof granda vico da vortoj novaj, sur bazo de la citita regulo kreitaj, riĉigis nian literaturon. En la lastaj jaroj komencis aperadi kolektoj de tiaj vortoj sub titolo „Oficiala aldono al la fundamenta vortaro". Kelke da membroj de la Lingva Komitato (Boulet, Mučnik) prenis sur sin la tre laŭdindan taskon, serĉi en la verkaro precipe de dr. Zamenhof kaj notadi liajn nove kreitajn terminojn. La formoj de plejmulto da vortoj estas tre evidente nenio nova kaj ĉiu, kiu bezonus esprimi la saman ideon, kreus al si la saman vortformon, ekz.: ametisto, kondoro, kandelabro, jaspiso ktp. Tamen kelkaj vortoj de dr. Zamenhof meritas specialan citon, ĉar ili tieldrire povus esti notitaj en la lingvo-trezoro, la Fundamento: estu cititaj el liaj lastaj verkoj (religiaj) la sekvantaj:

Granda ***abundeco*** en la tuta Egipta lando (hojnost). Kaj li ***afliktiĝis*** en sia koro (sklíčiti-aflikti). Kaj fermiĝis la ***aperturoj*** de la ĉielo kaj ĉesis pluvi (průduch, otvor). Kaj li prenos plenan karbujon da ***ardanta*** karbo (žhoucí). Faru al ni ***arkeon*** el ligno gofer (archa). Kaj prenu ĝian sangon kaj ***aspergu*** la altaron ĉirkaŭe (pokropiti). Kaj vin ĝi ***aspiros***, sed regu super ĝi (hlásiti se oč). Kaj li ankaŭ ***aŭguros*** sur ĝi (věštiti). Du ***braceletojn*** por ŝiaj manoj (náramky). Supro de ***digno*** (hodnost). Mi venigos akvan ***diluvon*** (potopa). Ĉu li estas fremdulo aŭ ĉu li estas ***indiĝeno*** de la lando (domorodec). Aromajoj por sanktoleadoj kaj por bonodoraj ***incensoj***

(kadidlo). Li estas *kalvulo* (kalva-plešatý). Kaj sanktoleu ilin kaj *konsekru* iliajn manojn (posvětiti). Se homoj *kverelos* kaj unu batos la alian (hašteřiti se). Kaj mi sendos *krabrojn* antaŭ vi (sršeň). Metu vian manon en vian *sinon* (klín). Sed la tritiko kaj la *spelto* ne estis batdifektitaj (špalda). *Tabernaklon* faru el dekdu tapiŝoj (svatostánek). La dekdu *triboj* de Israel (pokolení, kmen). Transpasis la *vadejon* de Jakob (brod). La Eternulo diris al Abram en *vizio* (zjevení). Faraono ordonis en tiu tago al la *voktoj* de la popolo (správec) ktp.

Jen, legante verkojn de nia eminenta dr. Zamenhof, kiom da instruo ni povas ĉerpi! La nomitaj vortoj, kvankam plejparte uzataj jam ankaŭ de aliaj aŭtoroj, ricevas en verkoj de Zamenhof oficialan aprobon, kiu faras ĉian dubon pri ilia internacia formo superflua.

BIBLIOGRAFIO.

Biblioteko kaj arĥivo de s-o Georg **Davidov** en Saratov, kiu posedas preskaŭ ĉiujn eldonajojn esperantajn, fariĝas pli kaj pli grava kaj valora kolekto. Ĝia fondinto, kies energion ni laŭdas kaj admiras, preterlasas neniun okazon por havigi al si ĉiun esp. presaĵon, pri kiu li trovas noton en la gazetoj. Ni povas diri, ke ĉio estas de li konata, ĉiu, eĉ la plej simpla poŝtkarto kun esperanta teksto ie ajn eldonita estas de li notita kiel mendotaĵo. Sen la persistemo, kiun pruvis nia amiko, lia muzeo ne povus post 25-jara vere formika laboro elmontri kolekton tiel plenan. Jam dufoje aperis ampleksaj katalogoj de lia biblioteko: ĝis la tempo, kiam aperos la preparata katalogo de Centra Oficejo, estos tiu ĉi verko de Davidov la sola spegulo de nia ĉiam riĉigata literaturo. Por plenigi la kolektojn, li eldonas sub titolo „Biblioteka Flugfolio" nomaron de libroj kaj gazetoj, kiuj mankas en lia muzeo. Sed la verkoj kolektataj per milfrankaj sumoj ĉiujare ne restas kuŝantaj en ŝranko senatente. Li ĉerpas el ili kaj ordigas laŭenhave la artikolojn, kompilas kaj redaktas interesan bibliografian verkon: po kajeroj aperas „Titolaroj de esperantaj verkoj tradukitaj el la naciaj lingvoj 1887—1913". Ĝis nun eliris kolekto de verkoj el literaturoj rusa, germana, franca kaj itala-latina-greka-portugala-rumana. La tuto enhavos 13 kajerojn. Krom tio aperis lia plena nomaro de esper. gazetoj, de muzikverkoj, de rusaj-esp. lernolibroj kaj lerniloj (pli ol 100 publikaĵoj!), poste serio da esp., broŝuretoj kun varia enhavo (artikoloj, rakontoj). Historio de esp. movado en Saratov (tre interesa historia dokumento pri la malfacila laboro de niaj pioniroj dum la unua kvaronjarcento), propagandaj flugfolioj nacilingvaj (Rusa, Germana, Latva, Estona, Litova Stelo ktp.), kelke da specoj de poŝtkartoj kaj sigelmarkoj fine kolekto da kajeroj ruslingvaj pri Esperanto (Internacia Lingvo. E. por junularo. E. kaj lingvistiko. Slavismo kaj E. Estonteco de E. Artefarita lingvo. E. kaj turismo. E. kaj instruistoj ktp.). Krom la nomitaj eldonaĵoj aperas trifoje en jaro lia ŝerca esp. gazeto „Pulo", gazeto „Sago" kaj (dumonata) bulteno „Okultismo". Ne po-

vante pli detale recenzi la belajn rezultatojn de la multflanke produktema laborenergio de s-o Davidov, ni rekomendas al ĉiu nia leganto, ke li petu de li nomaron de liaj verkoj (adr. S-o Georg Davidov, Saratov, poŝta kesto 12. Rusujo).

Jar. Mastný (Olomouc): *Esperantista movado en Moravio* (48 pĝ.) K 0·60. Nomaro de 500 moraviaj Esperantistoj, jaro en kiu ili ekstudis la lingvon, societo, kies ili estas membroj, gazetoj de ili legataj. Kvankam la movado precipe en la societoj estis antaŭ kelkaj jaroj multe pli vigla en Moravio, tamen la propaganda laboro de la unuaj samideanoj ne restis sen rezulto. Ju pli multe da homoj ellernos la lingvon, des pli malgranda fariĝados la kampo, sur kiu ĝis nun laboras la propagandistoj, kaj fine la societoj plenumonte sian propagandan taskon, perdos je sia signifo. Apero de tiu ĉi verketo sendube vigliĝos kelkajn el la amikoj, kiuj lastatempe forlasis la vicojn de propagandistoj, konservinte simplan „titolon" de adeptoj.

Esperanta Gvidlibro tra Genova de Dr. A. Stromboli. Prezo de 5 ekz. 1 resp.-kup. Adr. Poŝtkesto 922. — Tute nova, kaj ne malbona, estas la bazo, sur kiu estis tiu ĉi gvidlibro skribita. La celo sekvata de ĝia aŭtoro estas: rilatigi la fremdulon senpere kun la lokaj Esperantistoj, inter kies nomoj li povas elekti laŭplaĉe iun ajn, ĉu konsiderante lian profesion aŭ proksimecon de loĝejo ktp. Sekve la informa laboro persona kaj skriba ne restus ŝarĝata je unu persono-delegito, kiel ĝis nun okazas, — sed ĉiu, kiun interesus profiti ĉeeston de fremdulo kaj kiu ŝatus servi al li per konsilo, povus enskribigi sin en tiaspecan nomaron de lokaj samideanoj. Ni ne dubas, ke foje, kiam la informa laboro superos la fortojn de la nunaj delegitoj, en kies manoj nun ĉiu informa laboro amasiĝas, pli aŭ malpli frue oni devos solvi la demandon laŭ tiu ĉi metodo, precipe en la grandaj urboj. La gvidlibroj fariĝos samtempe adresaroj, en kiuj oni trovos senpere tiun, kiu plej eble povos doni al ni informon, kiel ekz. al samprofesiano k. s En la supre nomita gvidlibro estas presita nomaro de 80 geinstruistoj, de sep inĝenieroj, de du pastroj, de sep reprezentantoj kaj de eble cent aliaj, laŭ ilia profesio ordigitaj samideanoj; kelkaj el ili perfekte posedas la lingvon, sed ilia adreso ĝis nun restis nekonata kaj ili eĉ ne trovis okazon por uzi la lingvon en praktiko. Tre prave diras dr. Stromboli: Esperantistoj ĝis nun estas kiel personoj kiuj posedas telefonaparaton sed ne donis sian numeron al la oficejo; tiamaniere ne estas eble kun ili paroli kaj ili trovas la aparaton senutila.

Ch. Richet: *Sokrato.* El la franca lingvo tradukis en ritma prozo Jean Couteaux (Paris, X. rue Bichat 40.) 101 pĝ. Prezo 1 Sm (K 2·40). Tiu ĉi kvarakta tragedio estos ludita ĉe la X. Pariza kongreso esperante, same kiel la komedio Georgo Dandin de Molière. Estas konsilinde, ke verkoj de tia speco kaj celo aperu sufiĉe frue, por ke la kongresanoj povu ilin ĝustatempe trastudi. La libro estas presita de la P. E. S. kaj ĝia aspekto estas vere luksa.

Albumo de japanaj vidaĵoj kaj moroj, reproduktitaj kun permeso de Tecudo-in (Registara Fervoja Oficejo) kaj esperante skribitaj de K. Takahaŝi. Adr. Otemaĉi, 8-ĉome, Hiroŝima. Japanujo. Prezo Sm 1·800 afr. (K 4·35). Japana informa eldonaĵo agrable nin surprizis: en bona Esperanto prezentas al ni ĝia aŭtoro sur 50 folioj (26 × 19) riĉan kolekton da elektitaj fotografaĵoj presitaj sur japana papero; la tuto estas lukse bindita laŭ japana maniero kaj provizita per bele desegnita kovrilo. La bildoj estas reproduktaĵoj

el granda albumo eldonita de la japana fervoja oficejo. La prezo de la verko, kompare al niaj eldonajoj similspecaj, ne estas malalta, sed tamen oni ne bezonas bedaŭri la sumon elspezitan.

For la batalilojn! Romano de la jus mortinta pacifistino Bertha v. Sutner aperos tiun ĉi monaton ĉe eld. Ader Borel en Dresden A. Struvestr. 40. Prezo bind. afr. M 3·30

Der Siegeszug des Esperanto von Dr. ph. Albert Steche, Mitglied der Zweiten Sächsischen Ständekammer (7 pĝ.).

Dr. L. L. Zamenhof: *Daklaracio pri Homaranismo.* Represo el „Homaro". 14 pĝ. Prezo 10 ekz. 50 ctm. (A. Thonney en Lausanne, 20. Ch. de Malley. Svisujo).

Homunkulus: *Solecaj animoj.* Unuakta gajajo trad. de O. Süssmann. Esperantista teatro n-o 1. Prezo 25 hel. (24 pĝ.). Eld. Egera Presejo en Eger, Hungarujo. — La ideo eldonadi kolekton da nelongaj teatrajoj, kiujn negrandaj societoj povus prezenti ĉe siaj vesperamuzoj, trovos sendube aprobon multloke.

Esperanto for all (10 hel.). Propaganda broŝuro (48 pĝ.) por Angloj, sufiĉe detale traktanta pri la evoluo de E. kaj pri ĝia gramatiko kun vortareto. La I. eldono aperis en 100.000 ekzempleroj. Eld. Brita Esp. Asocio en London W. C.

Das Esperanto ein Kulturfaktor. Band 4. Esperanto in der Praxis. Bearbeitet von Pastor Lösche, Leipzig (M 2·80 afr.).

Pořadatelstvo letošního sjezdu německých Esperantistů v Lipsku věnovalo všem účastníkům cennou knihu o 344 str., v níž shrnuty významné služby, které Esperanto svým stoupencům již prokázalo. V několika kapitolách pojednáno tu o všelikých oborech, do nichž Esperanto již zasáhlo; vlády, správy městské a policejní umění a věda, kongresy a výstavy, literatura, vojenství, mezinárodní obchod, průmysl, bankovnictví, náboženství, hnutí mírové, abstinentní a pod., vzduchoplavba, vyučování, tisk, turistika a celá řada jiných poskytla autorovi množství látky ke zpracování díla opírajícího se jen o cenné výsledky propagandy. Z ilustrací jmenujeme: pavilon „Esperanto" na výstavě v Lipsku 1914, místnosti král. saského ústavu pro šíření Esperanta (knihovna a čitárna), chek Esperantské Banky a přílohu „mapa stř. Evropy" s místy, kde jest světový esp. svaz U. E. A. zastoupen svými delegáty. Vřele doporučujeme našim přátelům, aby tuto knihu si zakoupili, neboť poskytne jim mnoho látky jak pro přednášky tak i pro informaci soukromou.

Ant. Štochl: *Dělnický zpěvník.* (176 str.) K 0·50, váz. K 0·70. Vyd. časopis „Zář" v Praze. Mezi 130 českými písněmi jest zařazena též esperantská hymna s nápěvem.

POR LA VIVO.

Latinaj k. a. dirmanieroj kaj ilia signifo (III.).

Eli, eli, lamma sabacthani. (*Mia dio, mia dio, kial vi forlasis min?*) Ekvoko de Kristo mortanta sur la kruco.

Errare humanum est (Erari estas homa). *La homa naturo kunportas en si eraremon.* Uzata por klarigi aŭ mildigi eraron aŭ pekon.

E ŭ r e k a! (*Mi trovis!*) Greka vorto, uzata proverbe, kiun ekkriis Arĥimedo, subite trovinte ĉe la banado teoremon pri la specifika pezo de korpoj.

E x a b r u p t o. (*Senprepare*). Ekz. suriri tribunon kaj paroli ex abrupto.

E x c a t h e d r a. (*De katedro*). Akcentigo de oficiala aŭtoritato: Kiam la papo parolas ex cathedra kiel ĉefo de la eklezio.

F e s t i n a l e n t e! ***Rapidu malrapide!*** Vortoj laŭdire de Aŭgusto; agu malrapide por atingi pli rapide bonan finon de laboro.

F i n i s c o r o n a t o p u s. La fino kronas la verkon.

F l u c t u a t n e c m e r g i t u r. Ŝanceliĝas kaj ne subakviĝas (la ŝipo). Devizo de Parizo, kiu havas ŝipon kiel emblemon.

Z CELÉHO SVĚTA.

Statistika služeb delegátů **U. E. A.** (Universala Esp.-Asocio) **za rok 1913**: Celkem vyřídilo 1400 zástupců tohoto světového svazu zal. r. 1909 výhradně pro praktické užívání Esperanta na 14.000 dotazů z oboru obchodu, turistiky atd. Počet dopisů ústř. kanceláře a delegátů přesahuje 66.700 kusů.

Esperanto **ve vrstvách dělnických** získalo již velmi mnoho stoupenců. V jejich časopisech esperantských byl projednávan návrh na ustavení Mezinárodního dělnického svazu esperantského, k němuž nepochybně bude položen základ při letošním pařížském kongresu na zvláštní schůzi, projektované francouzským dělnickým svazem (Paris, 121. rue de la Convention). — Ústředním orgánem tohoto hnutí jest „Int. Socia Revuo“ v Amsterodamě; dále vycházejí: „La Kulturo“ v Praze, „Le Travailleur Espérantiste“ v Paříži, „Antaŭen“ v Hamburku, „Arbeiter Esperantisten“ v Gravenhaagu a „La Voĉo de la Popolo“ v Šanghaji. Netřeba podotýkati že esperantská literatura byla již obohacena značným počtem publikací, vztahujících se na propagandu Esperanta mezi dělnictvem všech zemí.

V Číně nalezlo Esperanto již před 10 roky nadšeného stoupence v osobě ministra vyučování Tsaie. První kursy byly pořádány v Šanghaji profesorem německé školy Lu-Ši-Činem: mezi nejhorlivějšími propagátory byli hlavně protestantští missionáři, z nichž Rev. G. H. Hubbard založil esper. časopis „Stelo de l'Oriento“, ve kterém první řešil otázku zjednodušení čínského písma na základě esperantské abecedy. R. 1910 byly již založeny kluby v několika městech a časopis „Ĥina Socialisto“. V tom však vycházely články, které vláda považovala za „nebezpečné pro čtenáře“, na př. proti otroctví, mnohoženství, trestům tělesným a smrti, proti válce a v zájmu samosprávy Tibetu, Mongolska a Mandžurie; při bouřích proti Yuan Či Kay-ovi byl celý podnik zničen. Nový esp.-čínský týdeník „La Voĉo de la popolo“ založený v Kantonu byl však opět pronásledován a ani v portugalské državě Macao vláda čínská jej neušetřila. Uchýlil se konečně do Šanghaje, na půdu americkou, kde vychází až dosud. — Klub v Mukdenu má 50 členů.

„Boletim Telegraphico“ vydávaný vládou **brazilskou** uveřejnil již před několika lety výnos, který připouští podávání esperantských telegramů za obvyklou sazbu „jasných řečí“. U hlavních

pošt. úřadů v Brazilii lze již čísti nápisy portug.-francouzsko-anglicko-esperantské: „Komunikoj telegrafaj al la tuta mondo“.

Petrohradská odbočka esper. světového svazu **lékařů** uveřejnila za minulý rok na 40 článků v místních časopisech a uspořádala vedle několika schůzí a rozprav z oboru lékařství dva kursy esp. (v ženském ústavu lékařském a v lidové universitě), stálou výstavku v kanceláři lékařů přijíždějících za studiem do Petrohradu a na výstavě zdravotnictví. Krom toho rozeslala 1000 lékařům petrohradským informační tiskopisy o Esperantu.

Na III. Balneologickém a turistickém sjezdu v **Krakově** byl místní klub zastoupen dr. Medrkiewiczem, maj. lázní Slawinek, který přednášel o Esperantu a jeho významu pro lázeňská místa a turistiku. Předseda sjezdu dr. Mikolajski (předs. krakovského kongresu esp.) a několik přítomných lékařů-Esperantistů použili této příležitosti k nejúspěšnější propagaci. Byla zde též vystavena sbírka všech průvodců vydaných v Esperantu. Hlavní úspěch však jest získání rubriky esperantské v orgánu zem. lázeňského svazu „Zdrojownictwo i turistyka“ (Lwów), který jest rozesílán v tisících ex. do všech čítáren, hotelů, redakcí a rozdáván i na železnici.

Výroční schůze svazu esp. na **N. Zelandě** konala se o velikonocích v Auklandě; Esperanto nalezlo již i zde četné stoupence. V Auklandě konáno v zimě pět kursů; klub Wellingtonský čítá přes 100 členů. Na průmyslové výstavě bylo Esperanto zastoupeno výstavkou publikací a korrespondence. Předseda výše jmenovaného svazu G. Aldridge súčastní se pařížského kongresu.

Na kongresu obchodních a prům. svazů v **Lisaboně** byly předneseny tři rozpravy o Esperantu, které v jednotlivých odborových schůzích i v kongresním shromáždění došly jednomyslného souhlasu. Rovněž i v několika odborných spolcích konány přednášky.

V **hamburském** Variété „Flora“ byl uspořádán v dubnu esperantský večer, k němuž sešlo se několik set přátel Esperanta. Po obvyklých produkcích uměleckých sehrála Schwarzova společnost esperantskou burlesku „Rozbité zrcadlo“. Se stejným úspěchem byla tato scéna sehrána esp. již v Paříži, Berlíně, Drážďanech, Vratislavi a j.

Průvodčí el. drah v **Mnichově**, kteří navštěvovali kurs Esperanta, nosí ve službě odznak: zelenou hvězdu v bílém poli. Stejně i v některých jiných městech německých a hollandských mají strážníci, znalí Esperanta, právo nositi odznak.

* *

Ĉu la anoncoj en esperantaj gazetoj estas utilaj por la anoncantaj firmoj? Por respondi al tiu demando, „The British Esp.“ turnis sin al firmo „Holden Fratoj“, kiu delonge anoncas sin en multaj esp. gazetoj kaj tial havas la plej bonan sperton en tiu rilato.

Jen eltiroj el la respondo de firmo „Holden Fratoj“: **Al la** Ĉefredaktoro de „Brit. Esp.“ **Antaŭ 3 jaroj** mi komencis anonci mian firmon en Via gazeto. **Miaj spertoj estis tiel kontentigaj**, ke post 1 jaro mi decidis doni anoncojn al pluaj esper. gazetoj kaj de la Januaro 1914 mi presigas miajn anoncojn en pli ol 24 esp. gazetoj. La anoncoj sekvigis vastan interkorespondadon kaj sufiĉe grandan nombron de bonaj mendoj. Multaj el niaj klientoj fariĝis niaj konstantaj amikoj kaj faras mendojn post 2 kaj 3 jaroj. Multaj sendis al ni dankleterojn.

Dum mia 50-jara praktiko, kiel anoncanto, mi neniam ri-

cevis tiel bonajn efikojn, kiel dank'al Esperanto... La mendoj alvenas el diversaj partoj de la terglobo k. t. p. Kun estimo Henry Holden".

FELIETONO.

Al propagandistoj. Inter la multaj rimedoj, per kiuj oni povas sukcese veki intereson pri nia lingvo, mi konsideras plej efika la gazetaron. Mi mem redaktante en kvai bohemaj gazetoj rubrikojn pri E., konjektas, ke ĉiu povus kun sukceso turniĝi al redaktoro de sia loka gazeto kun peto, ke li akceptu similan rubrikon. Tamen, kvankam tia propagando estas tre bona, ĝi ne estas la plej efika. Laŭ mia opinio estas plej rekomendinde tradukadi el Esperanto en la nacian lingvon. Mi tradukis jam multe da artikoloj kaj rakontoj en la boheman lingvon kiuj aperis ĉiam kun la rimarko: „Tradukita el Esperanto". Kaj tiu ĉi vorto havas pli efikan influon je laiko ol detalvasta klarigado pri sufiksoj, gramatiko ktp. La leganto diras al si: Se oni povas per helpo de E. jam tian tekston interpreti, tiam la lingvo estas sendube perfekta kaj studinda. Poeto prof. Sekanina en Praha mem petis min, ke mi traduku kelke da orientaj rakontoj, el kiuj jam ses aperis en la revuo „Český Svět". La redaktorojn interesas precipe rakontoj de la plej fremdaj nacioj, kies lingvoj estas por ni malplej kompreneblaj. Danke nian Esperanton, ni ne konas malfacilajon, kiu povus malebligi al ni, ke ni ĉerpu el la literatura fonto alilingva: skribinte al kelke da delegitoj de U. E. A. mi estas nun provizata per la plej interesa materialo. Preskaŭ ĉiuj rakontoj el „Orienta Almanako" estis jam tradukitaj en la boheman lingvon kaj la redaktoroj ĉiam danke ilin akceptis. Provu, kiu havas la okazon — la rezultato vin ĝojigos. *(Xaver Kučera).*

El **„Dek malpermesoj** al Esperantistoj", kiujn prof. Christaller prezentas al legantoj de la nunjara eldono de „Kulturfaktor":

Ne fondu novan grupon, kiam la cirkonstancoj ne sufiĉe garantias la daŭron de ĝia ekzisto. Plejmulte la Esperantistoj havas emon al novaj ideoj, tial la logo estas granda, ke ili ekzistigu ion novan. Sed ĉiu grupo sen daŭra sukceso estas malfaciligo de la propagando, ĝia ekzisto pli malutilas ol ĝia nefondo. Unuavice estas necese, ke oni havu aron da konvinkitaj amikoj de nia afero, kiuj ne nur parolas pri la lingvo, aŭ eĉ publike paroladas por ĝi, sed kiuj uzas ĝin kaj bone konas la tutan movadon.

Evitu entute la manion por novaj fondajoj. Veraj Esperantistoj ne estas dormemuloj, sed energiuloj, sed ili evitu la staton de ekscitiĝo, ili ne ĉiam provu fondi ion novan, ekzemple novan ligon, asocion. Tro multaj organizajoj malakcelas la laboron, absorbas tempon kaj monon kaj malhelpas per tio la agadon eksteren. Ofte oni renkontas personojn tre iniciatemajn pri nova laboro, pri ŝanĝoj nedirektaj: kiam la grup-estraro aliras tiun aferon, tiam la proponinto restas flanke.

Reformo de niaj kongresoj? Okaze de la pariza kongreso publikigas „Kovno-Esperanto" la sekvantajn proponojn: 1. Oni devus forigi longajn lacigajn salutojn, anstataŭante ilin per simpla ilia cito. 2. Estas bone deklari mallongajn komunikajojn pri la plej gravaj okazintajoj el esperanta vivo dum la pasinta jaro. 3. Estus utile dediĉi unu kunsidon de la „Rajtigitaj Delegitoj" al la de-

mando pri la plej bona kaj efika propagando de Esperanto. 4. Estus dezirinde starigi kapitalon por eldonado de tiuj libroj (ekz. de enciklopedia vortaro), kiuj ne povas esti eldonitaj per privataj monrimedoj, kaj por aliaj, ĝenerale utilaj celoj. — Oni devus plie fondi komision pri reformo de universalaj kongresoj, aparte pritraktonte kelke da demandoj. i. a. ĉu ne estus pli oportune dividi la kongresojn je du partoj la afera kaj la amuza, el kiuj ĉiu okupus tri tagojn sinsekve.

Viva kaj tamen morta. En Moskvo aperis nova projekto de lingvo internacia: „Viva". Gia aŭtoro, Dr. Nesmejanov, klarigas en ampleksa verko (sur 435 paĝoj) sian volapüko-similan lingvon: Internacia ling i motivriv gramt linga „Vivo". S-o Kotzin, aŭtoro de la bone konata kritiko de Ido, diras en „Ondo" pri tiu ĉi projekto, ke la animo de Schleyer, migrante, enkorpiĝis en la aŭtoron de „Viva". Por skizi almenaŭ iomete la aspekton de tiu ĉi cetere neatentinda projekto, ni notas: pri la akcento ekzistas bonega, klarega regulo: longaj(?) vortoj estas pli ofte (!?) akcentataj sur la antaŭlasta silabo. La adjektivo havas la saman formon kiel la subjekto kaj oni diferenciĝas ĝin per pli granda komenclitero (kiel oni ĝin prononcas, la aŭtoro ne diras). Ni ne forgesu aldoni, ke la lingvo havas esceptojn!! Ekzemplo de deklinacio: patr, patra, patre: la pluralo alprenas -s, sed oni diras patres (ne patrs!) patras, patreys (ne patres!). La vorto o (akvo) deklinaciiĝas: o, oa, oe, oo, os, oas oes oos. Du (2) estas deklinaciata: duo, duoya, duoye, duoyas, duoyes k. t. p. Kompreneble, la aŭtoro de Viva plej severe kritikas la verkon de Zamenhof, sed ni povas konsideri lian mallaŭdon laŭdo.

Kial ni dediĉas lokon al tiu ĉi efemeraĵo? Por pruvi refoje al niaj amikoj, ke ili neniom bezonas konsideri grava ĉiujn provojn kaj eksperimentojn de idistoj, antidistoj, eksidistoj kaj reformistoj, kies miopeco kaŭzos por kelka tempo en la publiko malvigliĝon de intereso pri la internacilingva demando, sed la triumfon kaj venkon de Esperanto ĝi ne haltigos. Por ĉiu nova propono mankos sufiĉe da adeptoj kaj ĝi restos sole malviva kadavro kvazaŭ preparaĵo en alkoholo. Sed la naciaj redakcioj, avidaj skribi pri ĉio pli nova, ne hezitos dediĉi lokon al artikolo pri ĉiu simila novaĵo. Provu sendi al iu ajn redakcio noton pri „Viva", aldonu, ke ĝi estas la plej lasta, sekve la plej scienca verko kaj vi vidos, ke via noto trovos pli eble lokon en la gazeto el la plej signifoplena artikolo pri sukcesoj de la — malnoviĝinta jam por la redaktoro — Zamenhofa Esperanto. Eĉ artikolo de tia graveco kiel ekz. estas la pariza kongreso, pavilono esper. en la ekspozicio en Leipzig, monsubtenoj de Michelin kaj Steche, statistiko pri la servoj de U. E. A. k. s. pli eble trovos lokon en la korbo ol la plej senbaza „informo" pri iu plua nova lingvo. Ne estas bezone malesperi super tiu fakto: la redakcioj, vidonte post tempo, ke ili estas sole viktimoj de ĉiu eksperimentisto, ĉesos konsideri tiaspecajn informojn gravaj kaj turnos fine sian atenton je tio, kio vivas, pri kio ili povos daŭre aŭdi kaj kio nun vastiĝas sen ilia scio. Ju pli multe da novaj, surpaperaj projektoj, des pli bone por nia afero; des pli klare evidentiĝos la vana klopodo de ĉiuspecaj reformistoj batalantaj inter si. Ni aldonas, ke de post apero de Esperanto naskiĝis jam d e k o j da novaj projektoj kaj malgraŭ la solvo de la demando — ni povas atendi ankoraŭ dekojn da plej novaj.

BIBLIOTEKO DE „CASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ".
1914 PRAHA. BOHEMUJO. N-o 7.

VORTOJ DE ZAMENHOF

ENHAVO:

La Espero. — Letero pri la deveno de Esperanto. — Paroladoj en la I. — VIII. internaciaj kongresoj. — Parolado en la londona Guildhall. — Cirkulera letero al ĉiuj Esperantistoj. — Deklaracio pri Esperantismo.

(75 paĝoj.)

Eldonis: ED. KÜHNL, Praha II., Dittrichova ul. 7. Bohemujo.

PREZO: K 0·75 (Sm 0·310). — Sur pli bonkvalita papero 1 K (Sm 0·420). Pagu per la Ĉekbanko, int. resp.-kuponoj aŭ poŝtmandato. Ĉe mendo de almenaŭ 10 ekz. rabato 10%.

KORESPONDANTOJ (*daŭrigo*):

En tiu ĉi rubriko estas publikigataj senpage adresoj de alilandaj samideanoj, kiuj serĉas korespondantojn inter Bohemoj. Atentigu pri tio viajn amikojn!

(*Mallongigoj*: int. = interŝanĝas; il. k. = ilustritaj kartoj; p. m. = poŝtmarkoj; bdf. = gluu la p. m. bildflanken; sgm. = sigel-m.):

*116. F-ino Florinda Cárdenas, *Oruro*. Bolivio. Suda Amer. — *117. S-o L. Haensler, *Bradford*, 24. Binnie st. Anglujo (p. m.) — *118. S-o Frank Pitt, *Gloucester*, 50 Goodyere str. Anglujo (il. k.). — *119. S-o F. Caulier, *Cassel*, 40. r. de Bergues. Francujo. Nord (il. k.) — *120. Kursanoj de la popollernejo en Potschappel, 20 knaboj, dez. kor. kun negerm. gejunuloj. Ĉiam tuj resp. Adresu: S-o W. John, instruisto en *Potschappel*, Dresdnerstr. 28. Saksujo. — *121. S-o Kar. Frey, *Schöntal* Kron Cherson u. Rusujo. — *122. S-o Fr. Isermann, *Nordhausen a. Harz*, Hallosche str. 44. Germ. — *123. S-o Maurice Bicker, *Koekelberg-Bruxelles*, av. de l' Indep. 13. Belgujo (il. k., let., p. m.). — *124. S-o Georgo Feješ, *Somberek-Baranyam* Hungarujo (p. m.). — *125. S-o Jos. Böhm, *Budapest*, Apafty ut. 40. X. Ker. Hung. (p. m.). — *126. S-o Jos. Skrabák, librotenisto, *Budapest*, VII. Zuglo Telep. u. 32. Hung. — *127. S-o Milko Dobrovoljac, ev. pastro, del. U. E. A, *Požega*. Kroatujo (il. k., naciaj kostumoj, p. m., moneroj, fotogr. de esp. grupoj. Ĉiam resp.). — *128. S-o F. Haluska, *Budapest*, IX. Saroksari u. 18. Hung. — *129. S-o Weisz Gábor, *Ungvár*, Váralja u. 2. Hung. (il. k.). — *130. S-o Julio Szilagyi, *Ungvár*, Kaposi u. 16. Hung. (il. k.). — *131. S-o Mártono Róth, *Ungvár*, Ávpádvezer u. 57. Hung. (il. k.). — *132. S-o Róth Miklós, *Ungvár*, Hung. (il. k.). — *133. S-o Iz. Brüll, *Budapest*, Vt. Csengeri u. 55. I. 2. Hung. (let., il. k.). — *134. F-ino Fridmann Anna, *Banffyhunyad* Hung. (il. k.). — *135. S-o Clemens Wieczorek. r. terv. oficisto, *Oppeln* Breslauerpl, 13. I. Germ. (let., il. k., p. m., esp. gaz.; bfl.). — *136. S-o Paul Straube, instr. *Kahla* |S. A. Burg 12. Germ. (il. k., let., esp. gaz.) — *137. S-o W. Eberl, desegnisto, *Potschappel*, Dresdnerstr. 26 Saksujo.

Eldonanto: **Ed. Kühnl.**

Presejo de Národní tiskárna a nakladatelství spol. s r. o. v Praze.